
# INTERNACIA FERVOJISTO

42a jaro n-ro 3 1990



Dum la 42a IFK ni trajnekskursas plurajn fojojn, tamen ne en reĝvagono kiel tiu ĉi de la fervojo Kongsvingerbanen, kun silkkovritaj benkoj, cizelitaj lampoklošoj kaj floraj motivoj pentritaj sur la plafono. Vidu la vagonon en la Fervojmuzeo en Hamar.

## REDAKTORA BABILO

Jam denove ni estas en viaj manoj. Espereble ĝustatempe antaŭ la kongreso en Hamar, kies programo vi vidas ĉi-apude. Ni ne dubas, ke niaj norvegaj kolegoj streĉis siajn talentojn por fari same bonan kongreson kiel la antaŭa en la sama urbo, kaj evidente estas, ke la urbaj kaj regionaj aŭtoritatoj pozitive rilatas kaj agas al la kongreso. Ni pensu nur pri la faritaj videofilmoj kaj pri la alinomiĝo de Hamara strato omaĝe al Esperanto.

La malplia fermiteco en orienta Eŭropo certe ankaŭ donos specialan etoson al la kongresaj aranĝoj.

Cu ni sukcesos transformi tiujn plurajn pozitivajn primaverajn paspartuojn en konkretajn kaj daŭrajn atingaĵojn - tio estas nia granda defio, kiun ni devas atente pririgardi kaj priagi.

Ni havas la ŝancon. Cu ni havas la homfortojn?

Espereble!

Gis en Hamar

Red

## EĈ MONEROJ POVAS FARIĜI KAPITALO

Almenaŭ se ili estas sufiĉe multaj. Montriĝis, ke la kolekto, kiun ni aranĝis en Salou estis sukceso. Envenis entute 3162 ptas kaj 30.000 lit, kaj tio estas relative granda sumo, kiu povas helpi al la terminaraj aktivecoj.

Tial ni ripetas la eksperimenton, sed nun kun ĉiuj moneroj. Ni petas vin kunporti al Norvegio ĉiujn monerojn, kiujn vi havas en viaj tirkestoj kaj aliaj ujoj, kaj doni ilin al la terminara fonduso. Cetere mi esperas, ke en ĉiu lando estas minimume unu persono, kiu pretas hejmenporti la monerojn de sia lando kaj ŝanĝi ilin al pli konvenaj biletoj.

Henning Hauge
Kasisto de IFEF

esperanto

INTERNACIA FERVOJISTO

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.

**Redakcio:** E Henning Olsen, Åderupvej 182, DK-4700 Næstved.

INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO

**Sekretario:** D-ro Romano Bolognesi, Via Misa 4, I-40128 Bologna.
**Dana poŝtĉekkonto:** 1 25 80 36, IFEF, Banegårdspladsen 14, DK-9700 Brønderslev.
**Dana bankkonto:** 7353-350550, Provinsbanken, DK-9800 Hjørring (pagante per bankkonto aldonu 25 DKK por bankelspezoj).
**Svisa bankkonto:** 471-02, Thurgauische Kantonalbank, CH 8590 Romanshorn.
**Svisa poŝtĉekkonto:** CH 85-4110-5 Frauenfeld, IFEF, Banegårdspladsen 14, DK-9700 Brønderslev.






Por la dua fojo en sia historio Hamar fariĝos kongresurbo por esperantistaj fervojistoj.

La unua fojo estis en 1965, kiam okazis tie la 17a kongreso de IFEF, kaj dum la semajno 02.-08.06.1990 aranĝiĝos la 42a kongreso de IFEF en la Mjøs-urbo, kaj tiu aranĝo sendube premsignos la urbon kun la ĉirkaŭaĵo.

La urbdomo estos kongresejo.

Kompreneble tia fervojista kongreso en unua vico estas faka aranĝo, kaj la ĉefa afero fariĝos fakprelego kies temo estas: La ĉefa stacio de Oslo, kune kun diapozitivoj. Post la kongresfino oni aranĝos fakan ekskurson al tiu stacio por tiuj kiuj deziras rigardi ĝin.

Dum la kongres-semajno estos ankaŭ aliaj fakaj kunvenoj kun specialaj prelegoj kaj diskutoj, - sed okazos ankaŭ ampleksa kulturprogramo, aranĝota de homoj el Hamar kaj Hedemarken, kaj absolute ĉio okazos en la internacia lingvo Esperanto. Pere de tiu ni volas ekspozicii la kulturan vivon kaj aktivecojn en nia urbo kaj regiono por la tuta mondo.

Jen la kulturaj programeroj kaj ekskursoj:

- Ekumena diservo en la Katedralo matene dum pentekosta dimanĉo.
- Solena inaŭguro de la 42a IFEF-kongreso en la Teatrejo.

Konstanta adreso: 42a IFEF-kongreso
Karudveien 1
N-2340 Løten
Norvegio

Postĉeka konto: 2 67 31 19
42a IFEF-kongreso
Syrinveien 12
N-1700 SARPSBORG
Norvegio

- Procesio de la kongresejo sub gvidado de La Fervojista Blovorkestro de Hamar, post la orkestro iros uniformvestitaj gekolegoj el la diversaj landoj, kaj fine aliaj gesamideanoj.
- Solena inaŭguro de ESPERANTOGATA (La nuna strato Holmegata ricevos novan nomon).
- Enurba aŭtobus-ekskurso kun vizito en la Fervojmuzeo.
- Koncerto de la virĥoro Løiten Sangforening kaj de la katedrala orgenisto Ragnar Røgeberg, en la Katedralo.
- Bankedo kaj balo.
- Kultura vespero en la Teatrejo. Partoprenos: La popoldancgrupo SØLJA kune kun la orkestro Hedemarksensemblet, Elverum Trekkspillklubb kaj Løiten Sangforening.
- Tuttaga ekskurso per trajno al Røros.
- Kongresfina ekskurso al Lillehammer kun vizito en Maihaugen.
- Postkongresa ekskurso al Bergen kaj al la okcidentaj fjordoj.
- En la kongresejo estos poŝtoficejo kun speciala poŝtstampilo.



## P R O G R A M O

Ĉio okazos en la kongresa domo, se alia loko ne estas indikita.

| | | |
|---|---|---|
| SAB.02.06 | | |
| 09.00-22.00 | Akceptejo estas malfermita. Registrado okazas. | Salono B |
| 13.00 | Kunveno LKK-IFEF-estraro | Salono D |
| 20.00 | Interkona Vespero | Salonoj A + B |
| DIM.03.06 | | |
| 00.00-01.00 | Akceptejo estas malfermita. Registrado okazas | Salono B |
| 08.00-09.00 | Ekumena diservo en la Katedralo de Hamar | |
| 09.00-12.00 | Akceptejo estas malfermita. Registrado okazas | Salono B |
| 09.30-12.00 | Solena inaŭguro de la 42a IFEF-kongreso | La Teatro |
| 12.00-14.30 | Lunĉpaŭzo. Hotelo Victoria | |
| 13.15-14.15 | Oficiala akcepto ĉe la urbestro por la estraro kaj la komitato de IFEF | |
| 14.30-18.00 | Uniformprezentado. Procesio sub gvidado de la Fervojista Blovorkestro, de la kongresejo al la inaŭguro de la ESPERANTO-STRATO | |
| | Enurba ekskurso al la Fervojmuzeo | |
| | Vespero libera | |
| LUN.04.06 | | |
| 09.00-12.00 | Kunveno de IFEF-estraro - Komitato. (Ne publika) | Salono E |
| 12.10-13.30 | 1a laborkunveno de Fake Aplika Komisiono (FAK) | Salono E |
| 13.30 | Lunĉpaŭzo. Hotelo Victoria | |
| 15.00-18.00 | Laborkunveno de la Terminara Komisiono (TK) | Salono E |
| 20.00 | Vespera koncerto en la Katedralo de Hamar | |
| MAR.05.06 | | |
| 09.00-12.00 | Unua plenkunsido | La Teatro |
| 12.10-13.30 | Redaktora kunveno | Salono E |
| 13.30 | Lunĉpaŭzo | |
| 14.30-15.30 | Fakprelego | Salono B |
| 15.40-17.45 | 2a laborkunveno de Fake Aplika Komisiono (FAK) | Salono E |
| 18.30 | Bankedo en Hotelo Victoria | |
| 20.00-24.00 | Kongresa balo. Hotelo Victoria | |
| MER.06.06 | Tuttaga ekskurso al Røros | |
| 08.30 | Ekveturo el Hamar per Esperantotrajno | |
| 12.00 | Alveno en Røros | |
| 12.15-13.30 | Lunĉo en Bergstadens Turisthotell | |
| 14.00-15.00 | Vizito en la preĝejo de Røros. Informoj pri la urbo | |
| 15.00-17.00 | Libervola promenado en la urbo. | |
| 17.10-20.00 | Reveturo Røros-Hamar | |
| ĴAŬ.07.06 | | |
| 09.00-12.00 | Dua plenkunsido | La teatro |
| 12.00-14.30 | Lunĉpaŭzo | |
| 14.30-16.50 | Fervojaj aktualaĵoj el la diversaj landoj | Salono B |
| 17.00-17.30 | Prezentado de la 43a IFEF-kongreso en Brno | Salono B |
| 17.40-18.30 | Kunveno por movadaj aferoj | Salono E |
| 20.00 | Kultura programo | |



| | |
|---|---|
| VEN.08.06 | Tuttaga ekskurso al Lillehammer |
| 09.00 | Ekveturo el Hamar per Esperantotrajno. Persona pakaĵo deponiĝas senkoste en la stacio de Lillehammer. Vizito en la popola folklora muzeo Maihaugen |
| 13.30 | Lunĉo. Kongresfino |
| 17.15-20.00 | Ekveturo per Esperantotrajno al Oslo S. En Oslo S estas faka vizito. |

**VOJAĜEBLECOJ INTER HAMBURG KAJ HAMAR**

| | | A | B | C | |
|---|---|---|---|---|---|
| Alvojaĝo: | El Hamburg Hbf | 07.03 | 15.23 | 19.18 | |
| | Al København H | 12.10 | 20.50 | - | |
| | El København H | 12.15 | 21.15 | - | |
| | Al Oslo S | 21.58 | 07.01 | 12.45 | |
| | El Oslo S | 22.55 | 07.55 | 12.55 | 14.55 |
| | Al Hamar | 00.39 | 09.21 | 14.49 | 15.41 |

| | | D | E | | F |
|---|---|---|---|---|---|
| Revojaĝo: | El Hamar | 05.20 | 13.39 | 14.50 | 20.49 |
| | Al Oslo S | 07.08 | 15.07 | 16.39 | 22.17 |
| | El Oslo S | 07.35 | 17.00 | | 23.00 |
| | Al København H | 17.24 | - | | 08.54 |
| | El København H | 17.40 | - | | 09.15 |
| | Al Hamburg Hbf | 23.04 | 08.33 | | 14.34 |

Por la alvojaĝo:

A: Rekta sidvagono 1a kaj 2a klaso Hamburg Hbf-Oslo S, ŝanĝo de trajno en Oslo S. Sidvagono 2a klaso Oslo S-Hamar.

B: Rekta lit-, kuŝ- kaj ankaŭ sidvagono (nur 2a klaso) København H-Oslo S. Ŝanĝo de trajno en Oslo S

C: Rekta lit- kaj kuŝ-, sed ne sidvagono Hamburg Hbf-Oslo S. Ŝanĝo de trajno en Oslo S, kie supozeble estas tro malgranda tempointervalo por ke oni atingu la trajnon, kiu ekveturas h.12.55

Por la revojaĝo:

D: Sidvagono 2a klaso Hamar-Oslo S, ŝanĝo de trajno en Oslo S al rekta sidvagono 1a aŭ 2a klaso al Hamburg Hbf.

E: El Hamar oni rekomendas ekvojaĝi h.13.39, ŝanĝo de trajno en Oslo S. Rekta lit- kaj kuŝ- sed ne sidvagono Oslo S-Hamburg Hbf.

F: Hamar-Oslo S; sidvagono 1a kaj 2a klaso, ŝanĝo de trajno en Oslo S. Rekta lit- kaj kuŝ-, ankaŭ sidvagono (nur 2a klaso) Oslo S-København H

**Aliĝintoj al la 42a Kongreso de IFEF**

**Stato: 20an de aprilo 1990**

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A = Aŭstrio | 6 | DK = Danio | 11 | NL = Nederlando | 3 |
| B = Belgio | 15 | E = Hispanio | 8 | PL = Pollando | 60 |
| BG = Bulgario | 17 | F = Francio | 48 | S = Svedio | 6 |
| CH = Svisio | 7 | GB = Granda Britio | 2 | SF = Finlando | 1 |
| CS = Ĉeĥoslovakio | 5 | H = Hungario | 26 | YU = Jugoslavio | 16 |
| D = FRGermanio | 26 | I = Italio | 21 | USA = Usono | 1 |
| DDR = GDR | 9 | N = Norvegio | 27 | Sumo | 315 |

## NOVA VIDBENDO PRI LA REGIONO HEDEMARKEN - La ĉirkaŭaĵo de Hamar, Norvegio

Antaŭ mallonga tempo la kulturaj instancoj kune kun la politikistoj en la norvega urbo Hamar eldonis videon kiel informaĵon. Tiu video eldoniĝis krom en norvega, ankaŭ en angla kaj en germana, kaj sekve de konsilo de la lokaj esperantistoj, oni ankaŭ decidis eldoni varianton en Esperanto.

Tiu video estis montrata publike por la unua fojo dum la 41a kongreso de IFEF en Salou, Hispanio en majo 1989, kaj poste ĝi estas dissendita vaste tra la mondo.

La rezulto estas ke Hamar estas sufiĉe bone konata, kaj oni nun esperas ke aroj da turistoj vizitos la urbon.

Sed la ĉirkaŭaĵo de Hamar ne estas prezentata en tiu video, tial ĵus eldoniĝis alia video, ankaŭ kun parolteksto en Esperanto. La titolo de tiu video estas: Sur la suna bordo de lago Mjøsa, kaj Per Johan Krogstie parolas.

Se oni deziras pruntepreni tiujn videojn oni enpagu NOK 50.- po pece al: Per Johan Krogstie, Karudveien 1, N-2340 Løten, Norvegio per poŝtĝirokonto norvega: 0805 5189030. Sur la slipo kiun ricevos la adresato oni nepre skribu pri kio la monsumo koncernas.

Per Johan Krogstie



MAPO PRI HEDEMARKEN HAMAR KAJ ĈIRKAŬAĴO

## DUDEKJARO DE LA DENTRADA FERVOJO

Dudekjaran jubileon festas ĉijare la dentrada fervoja linio en ĉeĥoslovaka montaro Altaj Tatroj. La linio kunligas la normalŝpuran fervojan linion Zilina-Koŝice de stacio Ŝtrba kun stacio Ŝtrbské Pleso de la mallarĝŝpura Tatramontara Elektra Fervojo Ŝtrbské Pleso - Porad Tatry. Oni komencis konstrui la fervojon en 1968 kaj regula trafiko tie ĉi komenciĝis en 1970 okaze de la ĉi tie okazanta Mondĉampioneco de skiado en klasikaj disciplinoj.

La linio 4,8 km longa estas elektrizita kaj ĝia itinero transpaŝas alton de 420 metroj kun meznivela ascendo 88 promiloj. Maksimuma ascendo troviĝas antaŭ enveturo en finan stacion Ŝtrbské Pleso kaj ĝi atingas 150 promilojn. La elektraj veturiloj por tiu ĉi dentrada fervojo estis fabrikitaj de la svisa firmao Brown-Boveri.

Okaze de la malgranda jubileo de tiu ĉi novtempa fervoja linio ni menciu, ke kunligo de la fervoja stacio Ŝtrba sur normalŝpura linio Zilina-Koŝice kun feria kaj banloka komplekso Ŝtrbské Pleso helpe de la dentrada fervojo estis realigita jam en la pasinta jarcento. La unua trafiko komenciĝis en la jaro 1896. La tiama dentrada fervojo estis prizorgata per vapora trakcio. Kaŭze de nerentabilitato oni en 1932 finis la trafikon kaj malkonstruis la linion. Renaskiĝo de la fervojo kun moderna teknika ekipo okazis ĝuste antaŭ dudek jaroj.

Jindřich Tomíšek



## La rallaroj* ricevos sian muzeon.

La fervojmuzeo en Hamar (N) montras la sunbrilflankon de Norvega Stata Fervojo.

Nun ankaŭ la laboreguloj - la rallaroj - ricevos sian meritintan muzeon. Ĝi konstruiĝos apud Finse la -, kaj sur la Bergenfervojo kaj en Nord-Eŭropo - plej altesituanta fervojstacio, 1222 metrojn super la marnivelo.

La kaŭzo de la konstruado de la muzeo en Finse, kompreneble, estas la streĉiga laboro kiu estis la konstruado de fervojo en ĉi tiu speciale senŝirma altmontaro. Ne subtaksante la signifoplenan laboron kiun la multaj laboristoj faris sur la ceteraj fervojdistancoj en nia longforma lando, la Bergenfervojo estis vere speciala. Precipe impona estas la distanco inter la stacioj Upsete kaj Haugastøl, kaj ĉi tie la kolektado de materialo, laboriloj kaj historio nun okazas.

Kiam la Bergenfervojo estis pretkonstruita kaj kun pompo inaŭgurita de Reĝo Haakon VII, ĉi tio estis rezulto de antaŭvidantaj politikistoj, lertaj teknologoj kaj, antaŭ ĉio, la rallaroj.

"Ilia multjara laborego ne devas esti forgesata", substrekas la iniciatantoj: Norvega Ŝtata Fervojo, Ulvik komunumo, Finse Bonfartsocieto, Norsk Jernbaneklubb ( Norvega Fervojklubo) kaj "Hotell Finse 1222".

Nia posteularo devas proprarigarde sperti ĉi tiun gravan parton de nia kulturhistorio.

(El VÅRT YRKE tradukis Odd Kolbrek)

* Noto: RALLARO estas sveddevena vorto, uzita por karakterizi precipe la fervojkonstruantaj laboristoj, kiuj vivis krudan kaj nekomfortan vivon, akompanante de loko al loko la konstruadon de fervojo.

## FERVOJISTA KONTAKTKUNVENO DUM LA 74A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN BRIGHTON (BRAJTONO) 1989

La 4an de aŭgusto okazis la fervojista kontaktkunveno kun la partoprenantoj de 36 personoj el 11 landoj. Prezidis inĝ. István Gulyás, vicprezidanto de IFEF kaj UEA-komitatano por IFEF, krome s-ro Lucien de Sutter, ĉefkomitatano de IFEF, s-ro Oszkár Princz, nun elektita estrarano reprezentis la Universalan Esperanto-Asocion.

La ĉeestantoj aŭskultis raporton pri la 41a IFEF-kongreso, okazinta en Hispanio, en urbo Salou. Ili ricevis detalan informon pri la venonta IFEF-kongreso, kaj pri la ĉijare aperinta fervojista fakvortaro. Okazis kelkaj tre valoraj alparoloj kaj proponoj. S-ro Gubbins el Britio faris fakprelegon pri la brita fervojo.

Ni devas rimarki, ke la fervojistan kontaktkunvenon LKK enprogramigis je vendredo - lastan tagon de la kongreso - en la "Dome Complex", kiu situas 800 metrojn for de la kongresejo. Pro tio dum la indikitaj horoj jam multaj kongresanoj ne sukcesis viziti ĝin. Menciindas, ke jam antaŭ la kongreso buŝe ni petis de LKK, ke nia kunveno laŭtradicie okazu ĵaŭde. Bedaŭrinde LKK ne akceptis nian peton, kaj vole-nevole tiu fakto multe malhelpis la fervojistan fakan laboron!
(El Hungara Fervojista Mondo)

## HIKARI EN MUZEO

Hikari signifas radion kaj oni nomis laú ĝi ankaú la plej rapidan trajnon de la mondo. Parto de ĝi staras en la japana ĉefurbo Tokio antaú la Trafika Muzeo. Oni ne povis lokigi en la muzeo la tutan trajnon pro ĝia longo, oni do lokigis tie almenaú ĝian parton.

Anstataú originaj 25 metroj la eksponaĵo longas nur 8 metrojn. Ĝi trafikis ek de 1964 ĝis la. jaro 1978, kiam oni forigis ĝin el trafiko pro teknika nekapablo. Sur linio Tokio-Osako kaj reen ĝi trafikis dekdumilfojojn per meznivela rapido 210 km/h, do entute 6 124 937 km. Gia rekorda rapido estis 256 km/h. La linion 552 km longa ĝi traveturis (enkalkulante haltojn) dum 3 horoj kaj 10 minutoj.

Antaú Trafika Muzeo apud Hikari staras unu el la plej fruaj vaporlokomotivoj. Japanoj uzis ek de 1872 unue anglajn lokomotivojn. La unua japana lokomotivo estis konstruita jam en la jaro 1892. Oni diras, ke dum ĝia unua solena veturo reprezentantoj de la imperiestra registaro antaú entrajniĝo demetis la ŝuojn sur la perono laú japana kutimo demeti ŝuojn antaú enpaŝi en la domon. En la celstacio Jokohamo okazis malfacile solvenda problemo, ĉar la ŝuoj de la registaranoj restis en fervoja stacio Ŝimbaŝi en Tokio.

Laústatistike vojaĝis ĉiu japano per superekspreso Hikari pli ol unufoje. Alveno de la trajno kaj el- kaj entrajniĝo en Japanio estas fulmorapida. Plej malfrue minuton antaú alveturo de la superekspreso la pasaĝeroj ordigas siajn valizojn laú vagonnumeroj sur kajo. Kompreneble oni vojaĝas kun sidlokbiletoj, pli precize ĉiu bileto estas samtempe sidlokbileto. Jam duonminuton antaú alveno de la trajno sur kajo estas sentebla premaera ondo - io simila kiel en metroo. La trajno haltas kun maksimuma devio 20 cm de la linioj sur la kajo. Dum unu minuto oni elkaj entrajniĝas. Dum la plidensigitaj trafikperiodoj la trajnoj trafikas en intervalo ses kaj duono da minutoj. Veturante en trajno oni eĉ ne sentas la rapidon. Per kia rapido oni veturas - oni povas informiĝi laú speciala rapidometro, lokigita en trinkeja parto. Se oni trairas la trajnunuon, la pordoj malfermiĝas kaj fermiĝas aútomate. El la trajno oni povas telefoni kien ajn. Se oni deziras trinki malvarman trinkakvon, oni povas senpage preni ĝin de aútomata aparato. La vendistoj priservas pasaĝerojn sen ke ĉi tiuj forlasu siajn sidlokojn, je dispono estas etaĝeroj kun aktuala gazetaro.

Esperantigis Jindřich Tomíšek

## KONKURENCO PRI NOVAJ TRAJNOJ AL KOREA RESPUBLIKO

Japanio, Francio kaj FRGermanio konkurencas pri modernigo de la sudkorea trajnsistemo. Sur du linioj la koreoj planas grandrapidajn trajnojn, kaj ĉiuj tri nomitaj landoj evoluis proprajn rapidtrajnojn, kiujn ili klopodas vendi al Koreio.

Japanio havas sian Ŝinkansen kun 270 km/h, Francio sian TGV kun ĝis 300 km/h kaj FRGermanio planas ektrafiki ICE poct ĉ 2 jaroj. Ankaú ĝi veturos 300 km/h. FRGermanio kaj Japanio ambaú evoluos MAGLEV-trajnojn, kiuj ŝvebas super la relo per 500 km/h.

Korea Respubliko ankoraú ne decidis, kiun sistemon utiligi. Grandrapidaj trajnoj unue trafiku laú la 380 km-a itinero inter la ĉefurbo Seulo kaj la suda havenurbo Pusan kaj 280 km-a linio de Seulo laúlonge de la marbordo.



## DE NIAJ LANDAJ ASOCIOJ

### DUOBLA JUBILEO DE JAFE

Jugoslaviaj fervojistoj esperantistoj festis antaú nelonge duoblan jubileon: 65 jaroj de organizita Esperanto-movado inter jugoslaviaj fervojistoj kaj 35 jaroj de JAFE. Unuope traktataj la jubileoj ne estas "rondaj", sed ilia sumo estas tamen estiminda: entute 100 jaroj. La jubilea manifestacio okazis en urbo Vranje (Suda Serbio) sabaton, la 21an de aprilo 1990 en ĉeesto de pli ol 200 membroj el 14 fervojistaj Esperanto-societoj kaj aliaj gastoj el la tuta lando.




En la unua taĉmento de fervojistoj-esperantistoj kiu kunvenis en Barcelona 1909 dum la 5a Universala Kongreso troviĝis ankaú unu jugoslavo: Jaromir Ivanović el Sarajevo. Li okupis gravajn postenojn en IAEF (nuna IFEF): prezidanto kaj ĉefredaktoro de ĝia bulteno. En la jaro 1924 dum la 24a Universala Kongreso en Vieno grupo da jugoslavoj (Stojnić, Puhalo, Prebil, Zupanić, Maksinović k.a.) transprenis la tutan estraron de IAEF. Baldaú fondiĝis societoj en Zagreb kaj Beograd (1925) kaj tiun daton oni nun festas kiel komencon de organizita Esperanto-movado inter jugoslaviaj fervojistoj.

Post la lasta milito fondiĝis JAFE (en aprilo 1955 en Beograd) kun Esperanto-societoj en pluraj fervojaj stacioj kaj nodoj (aktuale 14). En la jaro 1956 oni komencia en Zagreb la eldonadon de la bulteno "Jugoslavia Fervojisto" kiu ekde tiam senĉese aperas kiel organiza kaj faka organo de JAFE.

En kadro de la jubilea manifestacio en Vranje okazis ankaú komuna vespermanĝo kun arta programo kaj balo. Estis eldonita ankaú speciala poŝtkarto kj en la poŝtoficejo la tutan tagon funkciis speciala stampilo.

F.Ero

## BIBLIOGRAFIO

Zagreba Esperanto-Ligo (YU) prezentis sian novan bibliotekon kun la nomo ETLIBRO, kaj sub kies egido aperos libroj en 3 serioj: literaturo, lingvistiko kaj historio.

Al ni plej interesa estas "Historio no 1", 32paĝa kajero 14 x 11 cm: Fervojista Esperanto-Societo Zagreb 1954-1989". Kvankam faka la libro komenciĝas per poezio, tradukitaj tri strofoj de la kroata poeto Dobriŝa Cesarić. La libreto omaĝas la 35jaran jubileon de zagrebaj fervojistoj. La prezento ne limiĝas nur al priskribo de aktivado en la Zagreba FES, sed ĝi koncize tuŝas la jugoslavian kaj la internacian fervojistan agadon. La teksto ne estas provizita per subskribo de ĝia aútoro aú kompilinto. Plej verŝajne tiu estas la redaktoro de la serio mag. Franjo Ŝlabek.

(Laú Jugoslavia Fervojisto)

## PRINTEMPA RENKONTIĜO EN PRAGO

FS ĈEA kaj FS SEA kunlabore kun EK Praha komune organizis la ĉijaran Printempan Renkontiĝon "APRILO 1990", kiu okazis 30.3.-1.4.1990 en Prago. Partoprenis 145 esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, GDR, Jugoslavio kaj Pollando, pliparte fervojistoj.

Vendrede la 30an de marto okazis alveturo, loĝigo kaj interkoniĝo de la partoprenantoj kun la urbo kaj partoprenantaj gekolegoj.

Sabate antaŭtagmeze post solena inaŭguro oni dum seminario en Uzina Klubo Tesla Holešovice "Domovina" interŝanĝis spertojn pri laboro kaj agado en siaj E-kluboj, kaj praktike lernis kelkajn societajn ludojn.

Dum posttagmeza kultura programo oni aŭskultis recitadon de la konata praga E-aktorino Eva Seemannová, ĝuis solkantadon de Josef Vích el Nacia Teatro en Prago kun muzika akompano de la nevidanta esperantisto Jiří Vychodil. Ankaŭ magiisto Linhart Rýznar ricevis oftan aplaŭdon pro sia bonnivela magiista prezentado.

Dum vespera dancbalo kun tombolo oni bone dancis, kantis kaj amuziĝis ĝis noktaj horoj.

Dimanĉe antaŭtagmeze oni en grupoj promenis tra la urbo por interkonatiĝi kun kelkaj vidindaĵoj de la ĉeĥoslovaka ĉefurbo. Ĉiuj programeroj dum la Renkontiĝo okazis en Esperanto.

-JT-

## EKSTRAKTO DE TRE ĜOJIGA LETERO DE LA PREZIDANTO DE FS ĈEA

Kiel vi certe estas informita, multo ŝanĝiĝis en nia lando de post la "tenera" revolucio, okazinta post la 17a de novembro lastjara. Pli bone komencis agi ankaŭ nia Fervojista Sekcio ĈEA, pli bone dirite ambaŭ nialandaj sekcioj, ĉar kiel vi scias, slovakaj kolegoj refunkciigis sian Fervojistan Sekcion sub prezidanteco de inĝ. Magdalena Feifičová kaj dum la IFEF-kongreso en Hamar ili eble petos membriĝi kiel plua sekcio de IFEF.

Rezulte de plibonigita informa agado (laŭ mia scio ni aperigis lastjare sume 54 artikolojn, tradukojn aŭ informojn en la esperanta kaj faka neesperanta gazetaro) kreskis lastjare nia membraro je pli ol dudek membroj, nialandaj membroj de IFEF (abonantoj de Internacia Fervojisto) lastjare kreskis de 57 al 87, do altigo je 52,25%.

Krome mi povas kun ĝojo informi vin, ke ni sukcesis en nialanda tutŝtata faka gazeto Železničář ("La Fervojisto"), parte ĉeĥlingva parte slovaklingva, do ne esperanta, ek de la numero 1/1990 aperigadi regulan rubrikon "Esperanto". En ĝi estas kaj estos aperigata krom alio ankaŭ skriba kurso de Esperanto. La speciala kurso estas verkita de PhDr-ino Pavla Dvořáková kaj konsistas el 30 lecionoj, tio signifas, ke ĝi finiĝos antaŭ la 43a IFEF-kongreso en Brno. Por efike kunlabori kun partoprenantoj de la kurso, Ĉeĥa E-Asocio kaj ĝia Fervojista Sekcio kunlabore kun la redakcio de la revuo "Železničář" preparas por sendintoj de la kontrolekzercoj, kiuj aperos en ĉiu leciono, premiojn por la plej bonaj ellaborintoj de tiuj kontrolekzercoj. Oni krome preparas kunvenigi kelkfoje partoprenantojn de la skriba kurso en destinotaj tempo kaj lokoj, por praktiki lernitan materialon, sub gvido de la aŭtorino, kaj konversacii. La plej bonaj partoprenantoj de la tuta kurso ricevos pli valorajn donacojn. Ĉu tiu



ĉi iniciato ne estas aplikebla ankaŭ en aliaj landoj kaj de aliaj sekcioj de IFEF (landaj sekcioj)?
Kore salutas Jindřich Tomíšek

## Jarkunveno FS ĈEA

La ĉijara jarkunveno de FS ĈEA okazos en tagoj 28.-30.9.1990 en Staré Splavy apud Doksy, en belega naturo apud Máchovo lago. Mallonge el la programo:

Vendrede la 28an de septembro alveno kaj loĝigo de la partoprenantoj, promenoj en ĉirkaŭaĵon. Vespere interkona vespero kun videoprojekciado, babilado, kantado.

Sabate antaŭtagmeze post solena inaŭguro okazos laborkonferenco kaj balotoj. Post komuna tagmanĝo oni ekskursos al Doksy, poste oni navigos per ŝipo sur Máchova lago. Vespere amuza programo kun muziko kaj dancado, dispone al interesantoj estos ŝipetoj kaj akvobicikloj.

Dimanĉe antaŭtagmeze okazos promenoj en ĉarman ĉirkaŭaĵon de Máchovo lago. Post tagmanĝo la jarkonferenco oficiale finiĝos.

Partoprenkotizo por eksterlandanoj (laŭ nunaj validaj prezoj) 350,- Kĉs. Aliĝilon petu de: FS ĈEA, Jilská 10, CS 110 01 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

## 5a CENTRA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EN GDR

La Renkontiĝo okazas 25a-27a de majo 1990 en Brandenburg ĉe Berlin. La nova situacio feliĉe ebligas la partoprenon de multaj eksterlandaj esperantistoj. Krome la ŝanĝiĝoj en GDR kaj Eŭropo motivigos la partoprenantojn tutcerte diskuti la estontecon de la Esperanto-movado.

El la provizora programo:

Vendrede 25.5:

| | |
|---|---|
| De tagmeze: | alveno, akceptejo, libroservo, |
| posttagmeze: | gvidado tra la urbo, |
| je 20.00 h: | oficiala inaŭguro. |

Sabate 26.5:

| | |
|---|---|
| 09.00-12.00 h | plenkunsido kun diskuto aŭ forumo |
| 14.00-15.30 h | kunsido fakgrupoj |
| 17.15-18.30 h | prelegoj de eksterlandanoj |
| de 20.00 h | kultura vespero kun danco kaj distriĝo |

Dimanĉe 27.5:

| | |
|---|---|
| 09.00-13.00 h | ŝipekskurso, kun muziko |

La programo vendrede kaj sabate okazos en la urbocentro, en restoracio "Ratskeller", Alter Markt 10.

Informoj kaj aliĝoj al Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Otto-Nuschke-Str 1, DDR-1080 Berlin.

## Vidbenda servo (anonceto)

La Esperanto-movado ne postrestas. Nun oni proponas vidbendab servon, al kiu povas kontribui kaj pri kiu povas profiti la esperantanoj. Petu adekvatajn informojn ĉe Esperanto Video-Servo, Esperanto 1, 3°, 13, E-35010 Las Palmas de G.C., Hispanio.

## Fervojista Konferenco

De la 30a de septembro ĝis la 1a de oktobro 1989 en Velingrad (BG) okazis la 11a Nacia Konferenco de bulgaraj fervojistoj-esperantistoj. Ĝin partoprenis pli ol 6o aktivuloj el la tuta lando, reprezentantaj pli ol 500 membrojn de 14 kluboj.

Georgi Litov, prezidanto de la Fervojista Sekcio ĉe BEA (Bulgara Esperantista Asocio) prelegis pri la kluba laboro. Kelkaj prezidantoj de kluboj raportis pri sia aktivado kaj esprimis sperton pri sia kunlaboro kun lokaj societoj.

Ili kritikis la nunan estraron de la Fervojista Sekcio, ke la plej granda parto de kongresvojaĝantoj estas el Sofio, inter kiuj nur kelkaj personoj estas esperantistoj, kaj la aliaj turistoj kaj t.n. eternaj komencantoj.

Enju Enev, Burgas, prelegis pri la temo "Sonorigo de svislanda fervojo", kaj Lazar Karakaŝev, Plovdiv, faris prelegon "Egaligo de hispanaj kaj portugalaj fervojaj interrelaj distancoj kun la tuteúropaj".

(Prenita el "Bulgara Esperantisto", januaro 1990. La redaktejon de IF atingis neniu rekta sciigo).

---

## RENOMA BOLONJA BIBLIOTEKO KAJ ESPERANTO

La oficiala periodaĵo "L'ARCHIGINNASIO" en sia jarkolekto 86 (1986) enhavis 97 paĝojn pri la libroj en kaj pri Esperanto, kiun posedas la urba biblioteko "Archiginnasio" (arkiĝinasjo) en Bolonjo, Italio.

Represaĵo de tiuj 97 paĝoj ekzistas en formato 24 x 17 cm, kaj kun enmetita Esperanto-traduko de la 7paĝa enkonduko de Lanfranco Bonora, kiu priskribas la ekeston kaj evoluon de Esperanto, mencias la donacintojn kaj priparolas la enhavon.

775 titoloj estas listigitaj kun ĉiuj necesaj bibliotekaj informoj.

Ankaú la fervojistojn oni laúde mencias. Dum la priskribo de la Esperanto-movado tekstas i a: 'Laúnombre la plej forta estas la fervojistoj, nature favoritaj de la profesio en interŝanĝado kaj kontaktado kun eksterlandaj kolegoj. La organizo de tiu fako estas tiel efika, ke ĝi estas kapabla daúre organizi sian propran jarkongreson.

La teksto de la libreto estas en la itala lingvo - kompreneble, ĉar ĝi celas itallingvan publikon -.

Grave kunlaboris pri la preparlaboro d-ro Romano Bolognesi, sekretario de IFEF.

Tre interesa kaj prestiĝodona afero.

red



Il fondo librario esperantista
nella Biblioteca Comunale dell'Archiginnasio



*La F E R V O J A T E R M I N A R O*



*ne estas enlita legaĵo.*

*Fervojistoj utiligas*

*La F E R V O J A N T E R M I N A R O N*

*por ke la ESPERANTO FAKLINGVO estu*

*unueca ĉie.*

*Havigu ankaŭ al vi tiun*

*PLENAN VORTARON por FERVOJISTOJ*

*je aparte bonaj kondiĉoj:*

*1 Fervoja Terminaro kostas 12 GM*

*3 Fervojaj Terminaroj kostas po 10 GM = 30 GM*

*5 Fervojaj Terminaroj kostas po 8 GM = 40 GM*

*10 Fervojaj Terminaroj kostas po 6 GM = 60 GM*

*Se vi ne indikis deĵoradreson,*
*aldoniĝas la sendkostoj.*

*Mendu ĉe*

*H.Dieter Hartig, Kasseler Str. 76,*
*D-2800 Bremen 1, Germanio*
*aŭ*
*Henning Hauge, Bangårdspladsen 14/1*
*DK-9700 Brønderslev, Danio*

*Per via mendo vi subtenas la*

*Terminaran Komisionon de IFEF*

## KROKIZE TRA LA FERVOJA MONDO

**Rubaĵtrajnoj en Britio.**
La britaj fervojoj transportas pli kaj pli da rubaĵoj! Dum pli ol 10 jaroj funkcias sistemo apud Londono, kie en tri trakprovizitaj centraloj oni akceptas la rubaĵon de la metropolo kaj densigas ĝin en kontenerој, kiuj en kvar ĉiutagaj trajnoj estas transportitaj al deponejoj 80 km ekster la urbo.

En 1981 Manĉestro ekaplikis la ideon. De tri densigcentraloj tri ĉiutagaj trajnoj veturas al rubejoj 50 km ekster la urbo. Du el la trajnoj trafikas per unu vagonaro de 15 kontenervagonoj. La vagonaro do atingas du cirkulojn. Kamionoj povus esti atingintaj tri cirkulojn, sed je pli alta kosto je tuno.

En Avon (ejvn) tri urboj komune utiligas unu trajnon, kio signifas ĉiutagan cirkulon de proks 500 km.

Car la rubaĵtrajnoj trafikas liniojn kun pasaĝertrafiko, la Britaj Fervojoj (BR) devas singarde plani, ĉar malvolonte pasaĝeroj estu malfruigataj per rubaĵtrajno!

---

La fervoja linio Leningrad - Moskvo nuntempe estas la plej moderna en Sovet-Unio kaj la sola, kie la trajnoj trafikas per rapido superanta 100 km/h. Ekzemple eksprestrajno "Aurora" traveturas la distancon inter ambaŭ urboj dum 5 horoj kaj 50 minutoj, sed la novtempa rapidtrajno ER 200 bezonas nur 4 horojn kaj 39 minutojn. Gia meza rapido superas 140 km/h.

---

La plej longan veturon en la historio de fervojo plenumis vagonaro de la legenda "Orient-Ekspreso", konstruita laŭ modelo de la originaj vagonoj. Survoje el Parizo tra GDR, Pollando, Sovetunio kaj Ĉinio, kie oni surveturigis la trajnon al ŝipo kaj transportis al Japanio, traveturis la vagonoj distancon pli ol dekkvin mil km longa.

Hinda Fervoja Muzeo apartenas al la plej perfektaj kaj interesaj de sia speco en la mondo. Multnombran kolekton de historiaj lokomotivoj kaj vagonoj kompletigas informojn pri tio, kiamaniere disvolviĝis la hinda fervoja reto, nuntempe la dua plej longa fervoja reto en la mondo. La unua trajno sur teritorio de Hindio ekveturis jam la 16an de aprilo 1853 el Bombajo al Than, unu jaron poste sekvis linio en Kalkato kaj poste en Madraso. Komence oni konstruis ekskluzive larĝan ŝpuron 1676 mm, do la plej larĝan ŝpuron en tutmonda praktiko. Poste por ŝpari, oni mallarĝigis la ŝpuron de la nove konstruataj linioj kaj diverseco de la ŝpuroj kaŭzas malfacilojn ĝis nuntempo. Ĉiutage entrajniĝas en sesmil trajnojn pli ol 10 milionoj da pasaĝeroj. La suma longo de linioreto atingas 60 mil kilometrojn, kio estas unu kaj duono de la ekvatoro. Kun siaj 1,6 miliono da deĵorantoj estas la hindaj fervojoj senkonkurence la plej granda labordonanto en Hindio kaj unu el la plej grandaj en la tuta mondo.

---

En Stara Zagora en Bulgario oni konstruas novan fervojan panoraman linion. Celo de la projektistoj estas konstrui allogan aranĝon, kiu plenumos ankaŭ praktikajn celojn - la komforta trafiko kunligos urbajn parkojn kun apudurbaj parkoj de la kulturo kaj ripozo. En areo 1 km longa estos plantita parko de rozoj, konstruita porinfana aŭtostrado kaj ekspozicia halo. La fervoja linio direktiĝos al belega regionparto Lesnik. Gi estos ekipita per konvena aparataro kaj la priservanta personaro konsistos el mezlernejanoj kaj pioniroj de la urbo. Ĉiu haltejo estos ekipita per allogaj kulturaj, amuzaj kaj sportaj aranĝoj.



Konstruon de la nova fervojo partoprenos ankaŭ junulara Pionira Organizo. La junaj pioniroj kolektas uzitajn materialojn kaj eĉ brigade laboras cele al helpi en konstruado.

La unua milita transporto pere de fervojo en Eŭropo okazis la 31an de aŭgusto 1841 el moravia urbo Uherské Hradiŝte tra Břeclav al Brno (nuntempa Ceĥoslovakio). Gi konsistis el sescent soldatoj de la 12a bataliono de la kamparbaristaj soldatoj, kiuj sidis en malfermitaj vagonoj, kaj la oficiroj, veturantaj en du pasaĝervagonoj. La vojo 1155 km longa daŭris sep horojn.

La montara fervojo situanta en montpasejo Semmering, taksata kiel respektinda teknika konstruaĵo el unua duono de la pasinta jarcento, estonte fariĝos muzea eksponaĵo. Enkadre de modernigo de la aŭstraj fervojoj, okazanta laŭ nomo "Fervojo de la jaro 2000" la nova linio situos en tunelo konstruota sub Semmering.

En Japanio oni provekzamenas prototipon de amfibia trajno, kiu trakcios kiel surtere, tiel subakve. Laŭ opinio de aŭtoroj de la projekto la nova trafikilo supozeble komencos trakcii post dek jaroj. Sur la tero tiu ĉi "mara eksprestrajno" trakcios per rapido ĝis 200 km/h, en akvo ĝi atingos admirindan rapidon 70 km po horo. Gi trakcios sur unu relo, kiu en la maro estos lokigita en profundo de 10-13 metroj. Uzo de la subakva trajno estas proponata cele kunligi la dense priloĝatajn japanajn urbojn kun aviadejoj konstruotaj sur artefaritaj insuloj en la maro, kies projektojn preparas la japanaj projektistoj jam kelkajn jarojn.

Dum ekspozicio de la fervojaj modeloj en Leipzig vekis neordinaran atenton de la vizitantoj ujo por violono. Lokomotivestro Jörg Orzschia faris preskaŭ ĉiujn partojn de la minifervojo propramane. Lian hobion - la minifervojon en la ujo por violono li povas facile kunporti eĉ vojaĝante kien ajn.

Kompilis J Tomíŝek

## TUNELO OLIMPIO 2 MALFERMITA

En Lombardio (Italio) estis malfermita al trafiko 7,2 km longa tunelo Olimpio 2, kiu kunligas stacion Chiasso (SBB) kun Albate-Camerlata (FS).

La nova tunelo ebligos praktiki transitan ŝarĝtrafikon preter fervoja stacio Como kaj tiamaniere ĝi helpos al ĝia pli flua ekspluato. La novan linion uzos ankaŭ ekstraj trajnoj de la pasaĝera trafiko.

- JT -

---

## MEMORVORTOJ

John Moe forpasis la 20an de oktobro 1989 iom pli ol 71jara. Li naskiĝis la 4an de julio 1918, kaj kiel junulo li fariĝis maristo. Sed post kelkaj jaroj li dungiĝis ĉe Norvegaj Ŝtataj Fervojoj, kie li estis riparisto, kaj li emeritiĝis kiel deĵoranto en la lokomotivejo de Oslo Okcidenta stacio.

Relative frue dum la vivo John Moe interesiĝis pri Esperanto, kaj kiam la organizo Norvega Esperantista Fervojista Asocio en jaro 1949 fondiĝis, li aliĝis, kaj dum la resto de la vivtempo li estis ĝia fidela membro. Dum multaj jaroj li estis estrarano, li ankaŭ estis delegito de UEA.

John Moe estis tre afabla kaj ĝentila homo, kaj en lia proksimeco oni sentis sin kune kun bona amiko, kaj ni liaj plej proksimaj gesamideanoj nun funebras dum ni sentas perdon de bona amiko kaj bona kunlaboranto. Paco estu kun lia bona memoro!

Per Johan Krogstie
Prezidanto de NEFA




Aperis vivsignoj de rumanaj kolegoj. Ĉu ni vidos ilin en Hamar?

**FAKDELEGITO DE UEA PRI FERVOJOJ**

Individuaj membroj de UEA bonvolu pripensi la eblecon iĝi fakdelegito pri fervojoj. Tiel vi helpas al la prestiĝo de IFEF.

**Ankaŭ COTIF haveblas.**

En IF 2/90 pĝ 18 ni menciis kelkajn fervojfakajn publikaĵojn, kaj kie akiri ilin.

COTIF (Konvencio pri la internacia fervoja trafiko) ekzistas kiel 40paĝa broŝuro en formato A5 - tamen en tre limigita kvanto - kaj estas havebla ĉe JAFE, poŝtfako 563, YU-11001 Beograd. Prezo: 5,- DEM.

**FERVOJA KORESPONDA SERVO**

Georges JOLY, 19 rue Seguin,
F-69002 LYON.

Se vi deziras utiligi la servon, bonvolu indiki viajn nomon, aĝon, adreson, en kiuj landoj vi deziras korespondant(in)on, kaj pri kiaj temoj ktp.

Aldonu internacian respondkuponon (aŭ francajn poŝtmarkojn) por ĉiu dezirata korespondadreso.

**ENHAVO**

Moneroj fariĝos kapitalo ........ 34
42a IFK ........................ 35
Videobendo pri Hedemarken (N) ... 38
Dentrada fervojo (CS) ........... 38
Muzeo de "rallaroj" ............. 39
Fervojistoj en 74a UK ........... 39
Japana "Hikari" en muzeo ........ 40
Trajnoj en Koreio ............... 40
De niaj landaj asocioj:
JAFE .................... 41
FS ĈEA .................. 42
GDR ..................... 43
BG ...................... 44
Biblioteko en Bologna (I) ....... 44
La Fervoja Terminaro ............ 45
Krokize tra la fervoja mondo .... 46
Memorvortoj ..................... 47

Redaktofino por la venonta IF, kiu aperos en julio, estas 20.06.1990.

Presejo: Gefion Tryk, Tømrervænget 7, DK-4700 Næstved.